



NOVAJO

Jak Le Puil
Revenas mi

kun tekstolibreto
21 gld.

Stereofona

Afiŝo "Revenas mi"
30 x 42 cm. — 1,50 gld.

Marĉela
Venos Liber'

kun tekstolibreto
18 gld.



Ĝanfranko
Kontakto

kun ilustrita tekstolibro
Stereofona — 21 gld.



Ĝanfranko
La vojo


kun ilustrita tekstolibro
Stereofona — 21 gld.



Ĝuljo kaj
Ĝanfranko
Horo da
opozicio

kun tekstolibreto
18 gld.

Jak Le Puil
Danĝera ul'
kun ilustrita tekstolibro
Stereofona — 21 gld.



En preparo novaj kasedoj
— novaj surprizoj

La prezoj indikitaj (en nederlandaj guldenoj) validas por mendo kun samtempa pago. Se vi pagos nur post ricevo de la varo kaj de la koncerna fakturo, antaŭvidu 10% aldonon por administraj kostoj. **Se vi mendas almenaŭ tri ekzemplerojn de la sama titolo, vi ricevos 33% rabaton.** — Italoj bv. mendi laŭ la samaj kondiĉoj ĉe Co.Ed.Es. - Via Villoresi 38 - 20143 Milano - tf. 02/8350857 - pĉk 13647201.

Regnard en Ruslando

Ljudmila Ivanovna Mursalieva (Sovetio)*

La talenta franca komediverkisto *Jean François Regnard* (1655-1709) estas konata en la historio de la literaturo kiel unu el la plej fidelaj sekvantoj de *Molière*: «Kiu ne ŝatas Renjaron, tiu ne meritas admiri Molieron», skribis *Voltaire* (ref. 1955, 2, 205), honorante la talenton de *Regnard*. La soveta literaturesploristo *S. S. Mokulskij* (1946, 1, 607) nomis Renjaron «la plej granda heredanto de Moliero ĉe la limo inter la 17-a kaj 18-a jarcentoj»; li skribis, ke la renjaraj verkoj «havas nemalgrandan signifon ekkonan» (l.c., 608), kiam temas pri moraro de la putranta nobela socio en Francio de Ludoviko la Dekkvara. *Mokulskij* notis ankaŭ, ke la servistoj en la verkoj de *Regnard* estas «grava etapo survoje al transformiĝo de la tradicia servisto-intriganto en burĝan heroon-aventuriston de la Figaro-tipo» (l.c., 609).

Simile al *Molière*, *Regnard* pentris en siaj teatraĵoj la moraron de siaj samtempoj, sed distinge de *Molière*, kiu pentris tutan galerion de homoj el la plej diversaj socitavoloj, la socia satiro de *Regnard* estas direktita ĉefe kontraŭ la nobelaro. Fakte, li bildigas la tutan nobelaron: kortegajn dandojn, klaĉulojn kaj nenifarulojn; ĉefurbajn aristokratojn, cinikajn prodigantojn de l' vivo, ne konantajn aliajn okupojn krom gajaj festenoj, hazardludoj kaj amoraventuroj; aventuriston-parvenuon, ŝlemilan malspritulon kun malam al ĉiu progreso. Servistoj ankaŭ ludas gravan rolon en la renjaraj verkoj. Ili estas aktivaj, iniciatemaj, en multo superantaj siajn sinjorojn per intelekto, sprito kaj inĝenio.

La komedioj de *Regnard*, kiuj respegulis la vivon de Francio en la fino de la 17-a kaj la komenco de la 18-a jarcentoj, provokis grandan intereson ĉe la rusa publiko. Tion atestas la fakto, ke *Dramatiĉeskij slovarj* (1787), karakterizante renjarajn komediojn *Le Joueur*, *Les Ménechmes*, *Attendez-moi sous l'orme*, *Le Distrait* — alte taksas ilin kaj diras, ke en Rusio ili ĝuas merititan

* asistantino en la katedro de filologio, *Baŝkirskij Gosudarstvennij Universitet imeni 40-letia Oktjabra*. Ul. Bljuĉera 4/1-85, UFA-75.

... la arto eldoni

cp 213 - i-56100 pisa - italujo - tf. +39/50/48670 - pĉk 12230561

sukceson. La aŭtoro de la glosaro pritaksas la renjaran teatraĵon *Le Joueur* jene: «La teatraĵo oftas en spektakloj ĉie kaj ĉiam kun sukceso» (l.c., 63). La rusaj teatroj de la 18-a jarcento multfoje prezentadis la supre nomitajn komediojn, kion asertas ankaŭ *Letopisj ruskogo teatra* de I. Nosov. Precipe ofte en ĝi estas menciataj *Les Ménechmes* kaj *Le Distrait*. En la komedioj de *Regnard* ludis famaj rusaj aktoroj: I.A. *Dmitrievskij*, J. D. *Ŝumskoj*, A. V. *Karatigin*, T.M. *Troepoljskaja*. En 1791 sur la scenejo de *Boljšoj Teatr*, *Karatigin* debutis en la rolo de Hektoro el *Le Joueur*, havis grandegan sukceson kaj baldaŭ iĝis favorato de la publiko (*de Corvin 1890, 176*).

La teatra trupo de Moskva Edukista Domo kun granda sukceso debutis en Petroburgo «la 22-an de decembro 1799 en la teatraĵo de *Regnard: Le Joueur*, tradukita el la franca lingvo» (*Gozenpud 1959, 106*). En decembro, la sama trupo prezentis ankaŭ la renjaran *Le Distrait*.

Dmitrievskij, la plej granda aktoro de la rusa teatro, tradukis «kun grandega sukceso kaj proksimigis al nia moraro la komediojn *Le Distrait* kaj *Démocrate*. Ili ambaŭ estis multfoje prezentitaj ĉe *Russkij Pridvornij Teatr* kaj varmege akceptitaj» (*Novikov 1951, 300*).

La tradukitaj teatraĵoj de *Regnard* estis ankaŭ aparte eldonataj. La tradukoj estis ofte malfidelaj al originaloj: kelkfoje la vortoj, laŭ la opinio de la tradukinto tro kuraĝaj aŭ tro krudaj, estis moderigataj aŭ mallongigataj kaj el kelkaj frazoj (utilaj por edukado), male, elkreskadis tutaj monologoj. Ekz., la akuza monologo de Skapeno en la rusa versio de *La Sérénade* estas transdonita per pli diskretaj kaj ĝentilaj esprimoj:

«Ne eta zorgo ĝi ja estas por aŭdaca servisto plifirmigi profitojn de senmona sinjoro. Stulteca masko servas al tiuj plumknaristoj sen ajna kaŭzo; la salajro estas pagata, la sinjoroj insultaĉas, sed la servisto ofte havas pli da prudento, devigante ilin vivi... Ankoraŭ necesas peno elpensi milon da trompoj, kaj kun ĉio ĉi ni estas servistoj, kaj ili sinjoroj. Ne, tuj kiam tio finiĝos, mi volas alterne esti sinjoro». Komparu: «...*ils ne paient poin de gages, ils querellent, ils rossent quelquefois: on a plus d'esprit qu'eux, on les fait vivre, il faut avoir la peine d'inventer mille fourderis, dont ils ne sont tout au plus que moitié, et ils sont les maîtres. Cela n'est pas juste. Je prétends à l'avenir travailler pour mon compte; ceci fini, je veut devenir maître à mon tour.*» (*Regnard 1875, 7*). La substrekitaj vortoj de l'originalo evidentigas, kiomaj modifoj estas faritaj de la tradukinto *M. Okulov (1788, 45)*.

Kaj inverse, utila penso vidpunkte de la tradukinto ricevas pli plenan trak-

ton. Renjara aristokrato, mokanta maljunan koketulinon, diras en la rusa versio pli precize: tiu ĉi sinjorino «jam estas en la sesdekjara aĝo, sed ne malpli ol tri horoj sidas ĉe tualetoj kaj koleras, ke nia fraĉjo al ŝi ne enamiĝas» (*Renjar 1769, 23*).

La franca teatro profunde influis disvolvon de la rusa teatra arto. Rusia teatro estis malfermita en februaro 1757, sed en ĝia repertuaro mankis propraj rusaj dramverkoj, tial ofte estis surscenigataj tradukitaj verkoj (plejparte el la franca lingvo). Inter la tradukistoj precipe konata estis *A. Volkov*, «kiu dum tri jaroj pliriĉigis la repertuaron de la nova teatro per ne malpli ol dek tradukitaj komedioj de *Molière, Legrand, Rousseau, Regnard* kaj *Mari-vaux*» (*Berkov 1977, 44*).

En tiu epoko en la rusa teatro regis «komedioj, tajlitaj» laŭ francaj modeloj, en kiuj ĉiuj intrigoj kutime nodiĝas kaj sinapogas sur kanajlo-servisto kaj elturniĝema servistino» (*Danilov 1948, 107*). Ofte la francaj originaloj estis remodeligataj konforme al rusa moraro. Al tiaspeca remodeligo subiĝis ankaŭ la komedioj de *Regnard*: la tradukisto aldonadis en la tekston vortojn aŭ trajtojn el la rusa vivo de la 18-a jarcento. Ekz., la servisto Valenteno (el *Les Ménechmes*) revas, ke kiam li iĝos riĉa, li veturos en «fermita kaleŝo, kiun antaŭkuros du kur-heroldoj; malantaŭe staros negro-koĉero kun du kaleŝaj lakeoj» (*Renjar 1763, 124-125*). Poste li rezonas: «Mi havos pordiston, ĉevaliston, francon-ĉambriston, ne fremdlandan mi ne prenos, raraj el ili estas taŭgaj, mi dungos pli bone lokan. Sennombra multo da lakeoj kaj diversaj servistoj plenigos miajn grandegajn halojn» (l.c., 125).

La renjaraj herooj manĝas rusan barĉon kun biskotoj, trinkas anglan bieron, «nur antaŭtage alportitan de Petroburgo» (*Renjar 1769, 28*), amuziĝas en moskvaj drinkejoj, estas rigardontaj, «kiel la regimento trejnos sin ĉe la *Andronij-monaĥejo*» (l.c., 27).

En la komedio *La Sérénade* la servisto, fraŭdante la patron de sia sinjoro, prezentas sin al li kiel «*Jakov Ĥeremejiĉ Sedov*, negocisto el ĉifona bazaro, privilegiita» (*Renjar 1788, 65*).

Ofte la tradukistoj, sekvante la modon de sia epoko, ŝanĝadis la nomojn de renjaraj personaĵoj konforme al la ĉefa trajto de iliaj karakteroj. En la *Sérénade*, avara *Griffon* iĝis *Skrjagin* (= Avarulo), lerta servisto — *Prolaza* (= Trarampulo), uzuristo iĝis *Bariŝnikov* (= Akaparisto). Valer en la komedio *Le Distrait* nomiĝas *Ĉistoserdov* (= Purkorulo) k.t.p.

La samaj specifoj de tradukoj en la renjaraj teatraĵoj ofte konserviĝas eĉ

en la sekva jarcento. Ĉe la fino de la 19-a kaj la komenco de la 20-a jarcentoj, oni daŭrigas la prezentadon de la renjaraj komedioj en la rusaj teatroj. Aperas ankaŭ novaj tradukoj de liaj verkoj, faritaj de *D. Dudin-Borkovskij*, *V. Liĥaĉev*, *N. Samojlev*. *Pimen Arapov* (1861, 252) skribas, ke en aprilo de 1817 estis prezentita «la komedio Kartludanto (de Renjar) en 5 aktoj, versforma, tradukita de *Aleksej Miĥajloviĉ Puŝkin*; la spektaklon partoprenis plej bonaj aktoroj; nekompareblaj estis: *Brjanskij*, *Jakovlev*, *Ramazanov*, *Ĵelebeva* kaj *Orlov*, kiuj plenumis la ĉefajn rolojn». Plue *Arapov* komunikas: «Por benefico de la baletmajstro *Valberĥ*, la 19-an de aŭgusto *N. I. Ĥmelnickij* donis al la teatro la duan teatraĵon, tradukitan el la franca lingvo, *Les Folies amoureuses* de *Molière*». Juĝante laŭ la nomoj de la agantaj personoj, tiu teatraĵo estas verkita de *Regnard*, ĉar *Molière* ne havas teatraĵon kun tia titolo.

En 1852, en la 12-a n-ro de la rusa literatura-kritika revuo *Panteon* aperis artikolo, dediĉita al *Regnard*, kun mencio de franca revuo. Komparinte la tekston de la artikolo kun el diraĵoj de *Saint-Beuve*, ni faris konkludon, ke en *Panteon* aperis tradukita verko de *Saint-Beuve* dediĉita al *Regnard*. Kp. kun *Saint-Beuve* (1853, 115).

En la 19-a jarcento enciklopedioj, parolante pri *Regnard*, skribis, ke li rajtas okupi unuan lokon en la teatro post *Molière*. En la leksikono de *Brokgauz-Efron* (1899, 597) estas skribite, ke «La renjaraj komedioj prezentas valoran materialon pri postkulisa historio de la franca aristokrata mondo dum la 17-a kaj komence de la 18-a jarcentoj. Dank'al bonega scio de la sceno kaj ĝiaj kondiĉoj, kaj same dank'al la vigla kaj aŭdaca lingvo, la plej bonaj komedioj de *Regnard* ĝis nun estas spektataj kun granda plezuro».

Ankaŭ hodiaŭ la verkoj de *Regnard* ne estas forgesitaj. En 1940 estis eldonitaj unuaktaj komedioj *Le légataire universel*, en 1957 *Attendez-moi sous l'orme* kaj post unu jaro *Le Joueur*. En 1960 *I. Glikman* verkas artikolon, dediĉitan al *Regnard*. La artikolo estas antaŭparolo al la libro, kie estas publikigitaj ses la plej famaj renjaraj komedioj: *Le Joueur*, *Le Distrait*, *Démocrite*, *Les Folies amoureuses*, *Les Ménechmes*, *Le légataire universel*. La libro apartenas al la serio «Biblioteka dramaturga» kaj estas la unua eldono de la famaj renjaraj komedioj por la franca teatro, kiu aperis en la rusa lingvo.

La sovetia teatro de tempo al tempo prezentas komediojn de *Regnard*. En 1957, la Unua Moskva Regiona Teatro prezentis *Le Légataire universel*. La drama teatro de la urbo *Minsk* mulftoje prezentis *Le Joueur*.

La verkoj de *Regnard*, dank'al alta komedia majstreco kaj reliefa satira enhavo, respegulanta la moraron de la franca socio en la epoko de Ludoviko la Dekkvara, alvokas intereson de sovetiaj legantoj kaj spektantoj.

Referencoj

- Arapov, P.* (1861): *Letopisj ruskogo teatra*. — Sankt Piterburĥ.
Berkov, P. (1977): *Istoria ruskogj komedii XVIII veka*. — Leningrad.
de Corvin, P. (1890): *Le théâtre en Russie depuis ses origines jusqu'à nos jours*. — Paris.
Dramatiĉeskij slovarj (1787). — Sankt Piterburĥ.
Gozenpuĉ, A. (1959): *Muzikalnij teatr v Rossii*. — Moskva.
Ĥrestomatia po istorii zapadnojevropijskogo teatra (1955). — Moskva.
Mokulskij, S. (1946): *Nakanune Prosvješĉenia*. — En: *Istoria francuzskoj literaturi*. — Moskva, Leningrad.
Okulov, M. (1788): *Iz proizvedenij Renjara*. — Moskva.
Panteon (1852), *IV*, 12 *Smesj*, 1-8.
Regnard, J.F. (1875): *Oeuvres complètes*. - Paris.
Renjar, J.F. (1769): *Zadumĉivij*. Sankt Piterburĥ.
Renjar, J.F. (1788): *Serenada*. — Moskva.
Renjar, H.F. (1763): *Meneĥmi, ili blizneci*. — Sankt Piterburĥ.
Saint-Beuve (1853): *Causeries du lundi*, t.7. — Paris.
Voltaire, *Soveti jurnalistu* (ref. 1955, v. *Ĥrestomatia*...).

Renjar v Rossii

Francuzskij komediograf Ĵan-Fransua Renjar (1655-1709) — odin iz najbolee talantliviĥ posedovatelej Moljera. V svoiĥ komediaĥ Renjar vismeival poroki naroĉdajuŝĉegosja burfuaznoĝo obŝĉestva i pereĵitki feodalizma.

Komedii Renjara vizivali boljšoj interes v Rossii i neodnokratno perevodilisj na ruskij jazik. Dlja perevodov 18 veka ĥarakterno vesjma boljnoe obraŝĉenie s podlinnikom, namerennoe «sklonenie na naŝi nravi», kogda perevodĉik ne toljko smjagĉal ili zamenjal otdeĵnije repliki, no neredko i prevraŝĉal francuzskiiĥ aristokratov v rossijskiiĥ pomeŝĉikov, davaja im novie imena i zastavlaja svoiĥ geroev «ŝti s suĥarjami ĥlebatj». Eta tendencia soĥranilasj i v nekotorig perevodaĥ 19 veka. V 20 veke luŝĉie komedii Renjara izdali v adekvantniĥ v serii «Biblioteka dramaturga», iĥ stavjat mnogie teatri naŝej strani.